

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

„ILPE“

Pluraj artikoloj en diversaj esperantistaj gazetoj kaj sufiĉe da leteroj estis interŝanĝitaj en la internacia kontakto de esperantistoj pri la propono, ke estu fondita »ILPE«. Oni ofte povis legi, ke en Ĉeĥoslovakio estis, post la ekŝiĝo de EAĈSR el UEA, fondita Internacia Ligo de Progresemaĵ Esperantistoj (ILPE). La ideo fondi tian organizaĵon vere ekzistis en la vicoj de progresemaĵ esperantistoj en diversaj landoj kaj konkretan formon kiel »propono« ĝi trovis sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio.

Do nur propono kaj ĝi estis ankaŭ tiel kun la oficialaj rondoj (diversaj fakuloj por internaciaj aferoj) kiel propono pridiskutita. Morale tiu ĉi propono de ĉs. esperantistoj, ke estu fondita ILPE kun sia sidejo en ĈSR, estis de la oficialaj rondoj en Ĉs. Respubliko tute favore rekonita, sed la teknika flanko realigi tiun ĉi proponon fariĝis nerealegebla pro diversaj kaŭzoj.

1-e Mankis la garantio, ke vere la granda plimulto de la tutmonda esperantistaro estas ema fariĝi anoj de la proponata ILPE, mankis la bazo, kiom da vere progresemaĵ esperantistoj ekzistas en la mondo, kiuj fariĝus anoj de la proponata ILPE.

2-e Sen la okazigo de fondiga Kongreso de ILPE estas la propono fondi ILPE neebla kaj pro la multaj internaciaj malfacilaĵoj ne estis garantiite, ke el ĉiu lando povus veni al la unua kongreso de proponata organizaĵo kompetentaj, kaj al progreso sindonemaj esperantistoj. Montriĝis ankaŭ problemoj pri la ricevado de kotizaĵoj. Eĉ se la oficialaj rondoj en ĈSR estus emaj subteni komence tiun ĉi progreseman organizaĵon, tamen sen la rekta kunhelpo de ceteraj eksterlandaj grupoj de progresemaĵ esperantistoj, ĝi signifus grandajn elspezojn por ĉs. esperantistoj. Do la financa flanko de tiu ĉi afero estas ankaŭ unu el la kaŭzoj, kial la propono fondi ILPE sur la teritorio de ĈSR estis dume forŝovita al posta tempo, kiam la ĝeneralaj kaj la financaj cirkonstancoj estos por tia propono pli favoraj, kaj oni rekomendis al EAĈSR »plue labori kiel ĉeĥoslovakaj esperantistoj«, dume sen la proponata ILPE.

Do la proponata ILPE restas nur plano por nia estonteco. Eble post unu aŭ du jaroj, eble pli poste, povas la internacia situacio doni tiajn favorajn kondiĉojn, ke ILPE povos esti fondita en kiu ajn lando. Do la tuta propono, bazita sur bela ideo, kies radikoj estas en Francio, kie plej multe oni iniciatis fondi organizaĵon de progresemaĵ esperantistoj, restas nur propono, kiu certe foje trovos ĝustan momenton, kiam ĝi estos realigita. Do ILPE ekzistas nur en niaj sopiroj, en vicoj de sinceraĵ pacbatalantoj, kiuj per Esperanto servas al la nobla ideo, helpi la sekurigon de paco sur la tuta mondo.

Do ILPE estas ideo gvidilo — ne organizaĵo — kiu ligos en la tuta venonta laboro ĉiujn progresemaĵ esperantistojn al la kolektado de ĉiuj esperantistaj progresemaĵ

fortoj, kiuj foje trovas sian bazon ankaŭ en formo de forta internacia organizaĵo. Tio signifas, ke ĉiuj progresemaĵ esperantistoj studos la kondiĉojn, ĉu en ilia lando povos realigi tio, kio dume ne estis ebla sur la teritorio de ĈSR. Tio signifas, ke precipe Ĉina Esperanto-Ligo studos, ĉu tlu ĉi nobla ideo, fondi ILPE estus efektivegebla sur la teritorio de popola Ĉinio, kie la esperantistaro komencas tute novan vivon en sia liberigita patrujo, kaj al kiuj la internacia envidiĝo pere de proponata ILPE estus nova ligilo kun la esperantista mondo, ĉar la ĉinaj esperantistoj apenaŭ trovos la eblon envidiĝi al la neŭtrala UEA. Sed ankaŭ altaj progresemaĵ grupoj de esperantistoj en Skandinavio aŭ en aliaj partoj de la mondo studu la eblecojn pri la fondo de ILPE. Se ĝi ne sukcesis realigi nun en ĈSR, tio ne signifas, ke en aliaj landoj ĝi ankaŭ ne estus realegebla. Ni esperantistoj devas konstante bori la graniton kaj serĉi la plej malan lokon, ĝis ni trovos la taŭgan teron por nia semero.

Do ĉeĥoslovakaj esperantistoj provizore formetis sian aspiron al fondo de ILPE kaj atendas, ĝis kiam plifortiĝos internacie la ideo al ILPE, ĝis kiam estos grandaj amasoj da esperantistoj sur bazo de progreso, ĝis kiam esperantistoj en la mondo montriĝos pli batalemaj kontraŭ la nov-faŝismo, kiu denove minacas la mondon, precipe sur la teritorio de Okcidenta Germanujo. La fakto, ke la 36a Universala Kongreso okazos en Munĥeno, ja mem asertas, ke la esperantistaro devos ankoraŭ longe batali, ke en ĝiaj vicoj venku la progreso kaj vera amo al la paco, ĉar se ili povis en Parizo konsenti kun la loko Munĥeno, loko, kiu sonas en la oreloj de ĉiu progresema homo kiel resonado de eŝafodo, sur kiu estis pendigita la libereco de multaj nacioj, kaj el kie ekflamis la dua mondmilito, do certe ili nun devos montri pli da batalemo kontraŭ la preparata tria mondmilito fare de nov-faŝistoj, kiuj returniĝos al Munĥeno, al la nesto de siaj mondaspironoj. Do en tiu ĉi loko kunvenos nun esperantistoj kaj ni estas avidaj aŭdi fortan voĉon al Paco, progreso, kaj akran proteston kontraŭ la murdado de negroj en USOno. Vi ĉiuj ideoj ILPEanoj havos nun la okazon en Munĥeno agiti por la plifortigo de progreso kaj paco, por la Pakto de Paco, kiun certe la tuta kongresanaro en Munĥeno solene subskribos. — A. Malík.

Náš řádný sjezd 17. června měl velmi zdařilý průběh. Zvláště kladně byla hodnocena spontánní účast našich odboček v boji za mír. Byla zdůrazněna nutnost pečovat, aby nyní byli všichni účastníci kursů zapojováni do svazu; tím že dostanou slovníček, který vyšel v 5. čísle, je jim umožněno, aby četli náš orgán i ostatní esperantskou literaturu a vychovali se tak v přesvědčené stoupence našeho usilování.

Adolf Malik: Gloraj tagoj de glora partio

El inter la gravaj okazaĵoj en nia lando antaŭeniĝis la soleno de la 30jara daŭro de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio. En diversaj solenaj kunsidoj la ĉefaktivuloj de KPC rememorigis la komencan periodon de la Partio, kiu fariĝis la gvidanto de l'tuta nacio, de la tuta laborula klaso en Ĉeĥoslovakio. La paĝoj de ĝia historio estas plenskribitaj per herooj de la batalantoj por liberigo de la laborulo el sub la ekspluatistoj kaj perfiduloj de l'nacio. Tralegante tiujn liniojn, ni vidas, ke ĉiu vorto signifas forton kaj kredon je fina venko de l'justa batalo por la justa afero de la man- kaj spiritalaborularo. La popolo de Ĉeĥoslovakio havis en la tempo de l' Unua — la burĝa — Respubliko multajn politikajn partiojn. Ili ĉiuj promesis justan sociordon, feliĉon kaj bonstaton de la popolo. Ĝi havis ankaŭ fortan partion social-demokratian, kies membraro tamen en sia nepra plimulto ne konsentis pri la politiko de lakea komplezaĉo al la ĉeĥoslovaka burĝaro, pri la politiko praktikata de la ĉefministro Vlastimil Tusar. Estis la Tusar-registaro, kiu en septembro 1920 abdikis por cedi sian lokon al registaro oficista, kiu estis finplenmonta la perfidon, komencitan per la oportunistma politiko de la dekstrula gvidantaro de la ĉeĥoslovaka social-demokratio. Ĝi faris tion post la septembra kongreso en la jaro 1920, kiam la dekstremaj ministroj de la social-demokrata partio, estrataj de Tusar, ekiris la vojon de skismo en la laborista movado, vidante, ke la membraro de la partio kunmarŝas kun la honestaj partianoj Šmeral, Haken kaj Zápotocký. La reakcia registaro de la eks-aŭstria burkroato Černý estis aparato oficista preta por nuligi ĉiujn revoluciajn akiraĵojn, kiujn la popolo sub la influo de l' Granda Oktobra Revolucio estis per sia propra forto konkerinta. Laŭ postulo de la dekstremaj gvidantoj de la social-demokratio la registaro ordonis al la polico trudokupi la Popol-Domon en Prago, en Hybern-strato por ke oni malebligu la eniron al la maldekstruloj. Tio okazis en decembro 1920. Tiun ĉi atakon de la burĝaro kaj de la dekstremaj social-demokratoj la maldekstrularo respondis per ĝenerala striko, kiu daŭris unu semajnon kaj vastiĝis sur la tuta teritorio de la Respubliko. Partoprenis en ĝi pli ol miliono da laboristoj, sekvis grandaj manifestacioj en Prago, kie okazis kolizioj kun la polico. Policanoj pafatakis la popolon. En Kladno, en Ostrava, Brno, Oslavany, Liberec, Chomutov kaj en aliaj industriaj centroj oni organizis amasstrikojn kiel signon de protesto kontraŭ la reakcia registaro kaj kontraŭ la perfido de la social-demokratiuj ministroj. La polico ĉie brute sin intermetis. Eksterordinare akra kolizio de laboristoj kun la polico okazis en Most, kie 5 laboristoj estis mortpafitaj kaj 22 vunditaj. Jes, en la Masaryk-respubliko oni pafatakis laboristojn. La ĝenerala striko plivastiĝis ankaŭ en Slovakion. Ĝuste en la momento, kiam decide kulminis la krizo en la Partio, la reakcia registaro de Černý, tenante en la mano armilon, ekatakis la laboristaron por defendi la reakcion kaj la dekstrul-klikon de la social-demokratoj, kiu estis la laboristaron perfidinta. La maldekstrularo tiam ne havis subtenon de la laborula popolo en la kamparo nek de la mezaj tavoloj en la urbo. La ĝeneralan strikon la polico kaj la ĝendarmaro fine cedigis. La reakciularo faris venĝon. Miloj da laboristoj, manifestintaj sian heroecon en la decembraj bataloj, estis enkarcerigitaj. En la karceron en Pankrác estis metita ankaŭ Antonín Zápotocký. Kaj sekve en la jaro 1920 pro la perfido de la dekstrular-gvidantoj de l'social-demokratio kaj de la ceteraj politikaj partioj por periodo de preskaŭ unu generacio la batalo estis decidita por la utilo de la riĉuloj, la Respubliko ne fariĝis popola nek socialista, kiel deziris la popolo, sed burĝa, kapitalista. La popolo ekkonis, ke oni perfidis ĝin kaj ke ĝi devas formi partion, kiu laŭ la modelo de la Granda Oktobra Revolucio kondukos la laborularon al venko. Sekve en la tagoj de la 14a ĝis la 17a de majo 1921 naskiĝis la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio. Tiu ĉi partio

daŭrigis la tradicion de la Granda Oktobra Revolucio en Rusujo, kaj tuj dekomence ĝi fariĝis la antaŭgvardio de la laborista klaso de Ĉeĥoslovakio. Dum la Komunista Partio konsekvence defendis la rajtojn de la popolo, la dekstremaj gvidantoj de la social-demokrata partio kaj de aliaj politikaj partioj en la pasa periodo de ekonomia konjunkturo — en la jaroj 1926 kaj 1927 — plue estis malfortigitaj la laboristan movadon. La registaro de la »grandmoŝtula koalicio« malice tuŝis la laboristan social-asekuron. Denove eksplodis strikoj. La popolo ne lasis timigi sin de polican-kordonoj, kaj ĝi manifestaciis en la stratoj por eldefendi siajn rajtojn. La Komunista Partio proponis disvolvi la amasmovadon en ĝeneralan strikon, por ke la registaro ne povu realigi la malbonigon de la social-sekuro. La dekstremaj socialistaj gvidantoj denove faris perfidon, same kiel ili estis agintaj perfide en la batalo kontraŭ la plialtigo de l'grenoprezoj. Ili rifuzis organizi ĝeneralan strikon, kaj post la dorso de l'popolo ili aranĝis kompromison kun la registaro. Oportunismo enpenetris eĉ en la tiaman gvidantaron de KPC, la gvidantaro malfortiĝis, kaj sekve la burĝaro denove triumfis super la popolo. Kelkaj gvidantoj de la Partio ekkredis la frazon pri »stabiligo de la kapitalismo« — venis krizo de la Partio, kiun solvis la Kvina Partia Kongreso; ĝi fariĝis limŝtono en la evoluo de la Partio kaj de la Respubliko. La Partio, estante prilumata de la doktrino de Marx, Engels, Lenin kaj Stalin, ekbatalis kontraŭ la oportunismo kaj reformismo. Ĝi senrustigis la Partion, eksigante la oportunistojn, kaj elektis en la februara kongreso novan estraron, kies gvida persono fariĝis la juna redaktoro kaj energia porbatalanto de la laborulaj rajtoj Klement Gottwald; oni elektis lin kiel ĝeneralan sekretario de la Partio. Kune kun li estis elektitaj liaj kunlaborantoj el la juna generacio: Šverma, Slánský, Kopecký, Široký, Köhler kaj aliaj sindonemaj reprezentantoj de la laborula popolo, al kiuj precipe aliĝis Antonín Zápotocký kaj D-ro Bohumír Šmeral, unuj el la fondintoj de la Partio. La kongreso eksigis ĉiujn oportunistajn elementojn kaj faris el ĝi partion kapablan plenumi la revoluciajn principojn en la spirito de Lenin kaj Stalin. La Partio post la elekto de Klement Gottwald rapide transpasis de la oportunista pasiveco al la bolŝevika aktiveco kaj kreis la devizon: kontraŭ la malsaton, faŝismon kaj militon. La frazo pri la »stabiligo de l'kapitalismo« forvaporiĝis en la postaj jaroj de l'ekonomia krizo, kiam estis antaŭvidintaj Stalin, Gottwald, kaj kune kun tiu ankaŭ la juna estraro de la Komunista Partio. La bankroto en la nov-jorka borso en oktobro 1929 estis la brua enkonduko de la profunda krizo ekonomia, kiu en la sekvantaj jaroj trafis la tutan kapitalistan mondon. La armeoj da senokupuloj kreskis, kaj la okupatoj portis la tutan ŝarĝon de la ŝtat-elspezoj por la granda konflikto, antaŭsignita per tiu ĉi ekonomia krizo, el kiu la kapitalistoj firis egajn profitojn.

Kiam en 1933 en Germanio estis uzurpinta la potencon Hitler, subtenata de la germanaj armilfabrikistoj, la estraro de la Partio ĝuste distingis la danĝeron por nia popolo, ĝi konis la mensan staton de la ĉeĥoslovaka burĝaro kaj de la dekstremaj gvidantoj de l'socialistaj partioj, kiuj jam en la unuaj jaroj de Respubliko ne hezitis sendi ĝendarmojn kontraŭ la propra popolo.

Eĉ niaj tiel nomataj »patriotoj« ne atentis la avertojn, kiujn donis al ili la gvidanta partio de l'popolo, la Komunista Partio. Unuj pro sia malsaĝo, kredante, ke la alianco kun la okcidentaj potencoj kapablas savi la Respublikon kontraŭ la germana faŝismo, aliaj intence, asertante, ke multoble pli bona estas Hitler ol Stalin... Tiuj estis la veraj perfidantoj de la nacio, kiuj fine fordonis la Respublikon al Hitler, sen ke oni estus doninta eĉ nur unu pafon. Ĉeĥoslovakio fariĝis honorario donita al Hitler por tio, ke li atakos Sovet-Union.

(Fino sur p. 74)

Gabriel d'Arboussier, negro el Franca Afriko, estas membro de Tutmonda komitato de pacdefendantoj, membro de Internacia juĝantaro por honorigo per paco-premioj kaj unu el la plej bonaj fakuloj pri la afrika kulturo. Li verkis kelkajn studaĵojn, kiuj prilumas la problemojn de la afrika kulturo laŭ tute alia vidpunkto ol tion faris la burĝaj sciencistoj, starantaj en servoj de koloniistoj. Redaktoro de ĉeĥa ĵurnalo »Lidové noviny« prezentis al Gabriel d'Arboussier okaze de lia vizito en Praha kelkajn demandojn pri la afrika kulturo. Jen ili kaj la respondoj:

Kia estis la antaŭa oficiala burĝara koncepto pri la kulturaj problemoj de Afriko, precipe koncerne Francan Afrikon?

En pasinteco la ĉefan rolon havis la tiel nomata teorio pri »asimilo«. Ekzemple kolonelo Pannequin, la komandanto de francaj taĉmentoj en Hindoĉinio, deklaris en la jaro 1912: »Kiel ni devas por ni konservi Hindoĉinion? Kiel defendi ĝin? Ekzistas nur unu metodo: konservi ĝin por ni kaj defendi ĝin kun helpo de Anamanoj. Precipe estas necesa la politiko por kunproksimiĝo: estas necese doni al Anamanoj klerigon kaj ebligi al ili alvenon en ĉiujn profesiojn. Nun jam devas ne ekzisti konkerintoj kaj venkitoj, sed ĉiuj, kaj Anamanoj kaj Francoj, devas formi parton de unusola imperio. Hindoĉinio devas esti amiko kaj ne ŝtato. Tion sentante, la anama popolo leviĝos kaj iros kun ni en horo de danĝero...« Do tiel sen plibeligo aspektas la ĝuste soldatmaniere formulita politiko por »efektiva kunproksimiĝo«, kio estas nenio alia ol kunlaborado de ambaŭlanda burĝaro por konservi la imperialistan merkaton kaj ekspluatadon de popolo kunigita kun plano por francigo. Kaj memkompreneble, ke tio, kio validis por Anamanoj, konsiderataj kiel nacio klera, validis pli bone pri Afriko »la lando de sovaĝuloj«. La tuta kultura problemo depost tiu tempo malvastiĝas je nura problemo pri lerneja instruado, bazita sur netuŝebla principo de superreco de civilizito de la konkerinta nacio. Malgraŭ tio multaj el tiuj, kiuj vivis meze de tiu ĉi »barbara socio«, devis dume konfesi, ke ĝi havas propran kulturen vivon, kun kiu konatiĝi estas interese. Etnologoj, etnografoj kaj famaj sociologoj eklaboris pri studado de tiuj demandoj; pro tio ili fariĝis objekto de atakoj el flanko de adeptoj de senkondiĉa asimilo, kiuj ĉi ĉion konsideris superflua laboro. La etnologoj kaj la etnografoj devis defendi sin kaj tre elokvente faris tion unu el ili, Monsieur Labouret, kiu deklaris: »Por ke ni povu disvastigi importon kaj eksporton, estas necese detale ekoni indiĝenon — liveranton, aĉetanton eĉ impostpaganton.« Ĉu iu deziras pli bonan difinon de la tradicia koloniista koncepto, laŭ kiu ĉiuj problemoj de indiĝena loĝantaro havas nur tiom da signifo, kiam ili rilatas al interesoj pri koloniigo?

Por ke estu eble firmigi la regadon en la konkeritaj teritorioj kaj certigi la sendanĝeron de la koloniistoj, estas memkompreneble necesa ankaŭ la »ideologia« pravigo de koloniigado: kaj tio estas la fama tezo pri ĝia »civilizacia misio«. Por ĝia senkulpo ne ekzistas pli oportuna maniero ol kontesti, ke la popolo, kiun oni volas »civilizi«, havas ian propran kulturen.

Do koncerne la kulturen, la koloniista koncepto estas klopodo prezenti Afrikon kiel homan mason, en kiu regas malbela, malriĉo kaj barbareco, dume la eŭropa socio estas kontraste nura bela, riĉo kaj ordo. Estas facile imagi al si la praktikajn rezultojn de tiu ĉi politiko, kiel ili aperis en Franca Afriko. Sole la franca kulturo estis konsiderata kiel atentinda, estis rekonata nek la ekzisto de ia propra esprimo de la afrika kulturo, nek de literaturo, nek de muziko, nek de arkitekturo, nek de skulptarto. Lernolibroj pri historio eĉ prezentis tiun ĉi koncepton tiel, ke ili klopodis klarigi al junaj Afrikanoj, ke

iliaj antaŭuloj estis bluokulaj Galoj kun grandaj helaj barboj. Kaj tamen samtempe kun la eksporto de natura riĉaĵo el Afriko estis en Eŭropon eksportataj eĉ ĝiaj artrezoroj, kaj kolektistoj de bronzaĵoj el Benin, de maskoj el Baulé kaj de Sudanaĵoj statuoj konatiĝis kun la alta nivelo de la afrika kulturo.

Vid-al-vide tiujn ĉi malkovrojn, modifiĝis eĉ la oficiala doktrino koncerne la kulturajn problemojn. Anstataŭ teorio pri asimilo venis teorio pri akomodado. Laŭ tiu ĉi teorio ne estas eble kontesti la ekziston de la negra-afrika kulturo. Do ne temas pri tio perforte planti la francan kulturen en la afrikan teron, kiu estas konsiderata kiel nesribuzita folio, sed temas pri tio, »revalorigi« la negran-afrikan civilizon helpe de la franca kulturo. Tiu ĉi teorio do estas certa progreso, ĉar ĝi rekonas la ekziston de la negra-afrika civilizito, sed eĉ ĝi havas unusolan celon: pravigi la koloniigon.

»Kiel oni devas rigardi la problemon pri la afrika kulturo?«

Se oni volas paroli pri la afrika kulturo, oni devas unue lokigi la problemon teritorie, ĉar la atributo »afrika« rilatas al grandega parto de la afrika kontinento, kiu estas konsiderata kiel unusola tutaĵo. Do ni parolos nur pri la Okcidenta kaj Centra Afriko, pli precize dirite pri landoj, apartenantaj al la franca kolonia regno. Sed tamen ne estas eble forgesi, ke la estonda evoluo iros al nuligo de nenaturaj baroj, kiuj estis tie kreitaj de la eŭropa koloniismo.

Franca Okcidenta kaj Centra Afrikoj etendiĝas inter Dakar kaj Angla-egipta Sudano kaj inter Senegalo kaj Kongo kaj havas jenajn fundamentajn karakterizaĵojn: laŭ la geografia vidpunkto temas pri vastegaj teritorioj, dividiĝantaj je tri zonoj — la zono de arbaroj sude kaj laŭ la bordo, savana zono meze kaj dezerto norde, kun malalta denseco de loĝantaro, kun granda diverseco de rasoj kaj lingvoj; laŭ la ekonomia vidpunkto temas pri lando kun ekonomio terkulturista, preskaŭ sen ia ajn industrio, laŭ la socia vidpunkto la lando havas strukturon tribo-feŭdan kun plejparte kolektiva terposedo, laŭ la kultura vidpunkto ekzistas skribita literaturo influata de islamo, plue granda riĉa fundamento de buŝa tradicio kaj tre evoluinta skulptarto kaj muziko, religioj islama en regionoj de savano kaj dezertoj, kaj animisma en cetera lando.

Al tiu ĉi tuto estis altrudita kolonia regado de eŭropaj ŝtatoj, regado, kiu havis kiel sekvon la komercan ekspluatadon de ĝiaj fontoj, politikan kaj kulturen premon, montrantan sin en administrado, en juro, en instruado, kies unusola celo estis konservi analfabetismon, en kiu vivas ankoraŭ ĉiam 90 procentoj de ĉiuj loĝantoj.

Sed la koloniismo portas en si kontraŭel, kiuj pliakriĝas kun ĝia paŝ-post-paŝa evoluo. Eĉ se la ekspluatado havas ĉefe karakteron komercan, ĝi tamen alportas kun si disvolvon de hejmaj komercado, terkulturista produktado, kaj komencojn de industriigo. Eĉ se la administra kaj jura aparato estas en manoj de oficistoj, venantaj el metropolo, la afrikaj laboruloj estas necesaj. El tio rezultas necese eduki personarojn, kiuj de-tag-al-tago pli konsciiĝas la gravecon de la rolo, kiun ili havas en la ekonomia kaj socia vivo. Al tia konsciiĝado kontribuas eĉ la militoj, en kiuj la afrikaj soldatoj devas partopreni. Krome la regado, premanta ĉiujn naciecajn kompletojn eĉ ĉiujn sociajn tavolojn en ĉiuj landoj de Franca Afriko, kunproksimigas la tutan popolon kaj ĉiujn sociajn tavolojn.

Tiuj ĉi kontraŭecoj krevis en sia tuto forto en la momento, kiam la kompleta tutmonda imperiisma sistemo estis en fundamentoj skuegata per du mond militoj. Post la lasta milito la koloniaj nacioj rifuzas vivi plu tiel, kiel ili vivis en la pasinteco kaj la koloniistaj ŝtatoj estas devigataj al cedejoj sur kampo politika, ekonomia kaj socia. El tio fontas grandega disvolvo de liberiga movado ĉe la

koloniaj nacioj, kiuj samtempe staras antaŭ problemoj ekonomiaj, politikaj, socialaj kaj kulturaj ne disigeblaj unuj de la aliaj.

La prospero de la afrika kulturo estas do kondiĉata per firmigo kaj disvolvigo de la nacia vivo. Sed solvante la naciecajn demandojn en la samtempa stato de Franca Centra kaj Okcidenta Afriko oni renkontas malhelpojn, kies komplikeco estas por multaj preteksto por kaŝi la faktojn. Ankaŭ tie ĉi kiel aliloke la arboj staras por kaŝi arbaron. La diverseco de la rasoj kaj de la naciecaj grupoj, la kontraŭnatura administra teritoria divido, la okupado de unu lando de kelkaj eŭropaj ŝtatoj donas al Afriko kaosan vizaŭon, kiu unuavide kontestas aserton pri ekzisto de nacia tuto. Sed estas pli gravaj faktoroj, tiuj, kiuj rezultas el la naturaj diferencoj ekonomiaj kaj socialaj, kies limliniojn oni povas desegni laŭ la geografiaj zonoj, la arbara, la stepa kaj la dezertoj. Estas sendiskute, ke ĉe grupoj loĝantaj en tiuj ĉi diversaj zonoj oni trovas ĉiam pli grandajn parencecojn kaj rilatojn, se oni iras de oriento okcidenten kaj ĉiam pli grandajn diferencojn, se oni iras de nordo suden. Se oni rigardas de proksime la ekonomion, la socialan strukturon, loĝadon, vestmanieron, skulptarton, muzikon, dancon, religion, tio fariĝas tute klara. La koloniigo ankoraŭ pli grandigis la interrilatojn.

Malgraŭ la ekstrema diverseco de la afrika socio, el la pasinteco de la afrika popolo elmergiĝas tri unuigaj kulturaj elementoj: la tradicio, la negrida karaktero de plimulto de la rasoj kaj la animisma fundamento de ĉiuj religioj inkluzive la islamano. La graveco de tiuj ĉi tri faktoroj estas sendiskute. Ekzemple estas certe, ke la poezio, la muziko kaj la danco, kiuj atingis tre altan evolugradon, portas en si la signojn de la sama artisma genio de Senegalio ĝis Kongo kaj de Gineo ĝis Ĉado. Ankaŭ nekontestebla estas la negrida karaktero de la rasoj kaj la animisma bazo de religioj. Memkompreneble estus eraro forgesi la faktorojn ekonomiajn kaj politikajn, kaj voli el Afriko krei unu nacian tuton. Estas interese, ke fian teorion disvastigis tiuj, kiuj eĉ antaŭ nelonge estis defendantoj de senkondiĉa asimilo kaj nun el la rasa faktoro faras bazon por la politika, kultura kaj sociala disvolvigo de la nigra popolo. Kaŭzo estas nur tio, ke ambaŭ teorioj estas laŭ substanco por asimilo.

Plejparte oni eĉ nun asertis, ke por la kulturo de Meza kaj Okcidenta Afriko estas decidaj du problemoj: tiu de la lingvo kaj tiu de la raso. En efektiveco nek la komuna etnika fundamento mem, nek la komuna lingvo mem sufiĉas por krei la kulturon. En Franca Afriko same kiel ĉie aliloke oni ne povas paroli pri kulturo kreita nur sur fundamento de unusola (neekzistanta) raso, nek de unusola neekzistanta afrika lingvo, sed pri afrikaj kulturoj aŭ pri kulturoj naciaj, kies disvolvigo estas kunigita kun problemoj socia. Kaj nuntempe la tuta socia problemoj en Franca Afriko estas problemoj de batalo de popolo por liberigo el la koloniista jugo, de la batalo, kiu montriĝas en kreskado de vasta nacia movado.

Kiuj estas la perspektivoj de la kultura evoluo en Franca Afriko?

La perspektivoj de la kultura evoluo en Franca Afriko, kiel jam dirite, estas submetataj al perspektivoj de la nacia movado. Laŭ tio, se en tiu ĉi parto de Afriko kreiĝos unusola nacio aŭ pli multaj nacioj, oni havos unu aŭ pli multajn naciajn kulturojn, reciproke certe tre proksimajn, sed tamen diversajn.

Plej multe oni memkompreneble diskutas pri efiko de tiu ĉi kulturo aŭ tiuj ĉi kulturoj konsidere al la influo de kulturoj eŭropaj, kiun kaŭzas la kolonia regado kaj kies sekvo estas subpremado de la afrika kultura fundamento. Pri tiu problemoj estiĝis du teorioj. La unua apogas sin sur la penso pri »afrika renaskiĝo« kaj rifuzas rekonstrui la fremdan influon sur la originalecon de la kulturo. Tiu ĉi teorio havas gravan difekton, ĉar ĝi rifuzas ĉiujn valorojn

kreitajn aliloke ol en Afriko kaj direktas sin al kultura ŝovinismo, kiu estas en rekta kontrasto al vera kulturo. Ĝi direktas sin al rekomendado de kultura primitivismo, kiu farus el Franca Afriko siaspecan rezervejon por etnografoj kaj finfine senartigas la Afrikanojn en ilia batalo por libero kaj progreso. — Kontraŭe la dua teorio asertas, ke la afrika kulturo respektive kulturoj ne povas evoluigi laŭ la origina linio sekve de la premo, al kiu ili estas submetataj. Tiu ĉi vidpunkto, en kiu estas ero de vero, tamen forviŝas danĝere la pozitivajn faktorojn, kiujn en si posedas la afrikaj sociaj strukturoj de pasinteco. Ĝi esprimas siaspecan komplekson de malplivaloreco rilate al imperiismo, al kies premo laŭ tio ne estas eble rezisti en la momento, kiam la premo de demokratiaj fortoj kaŭzas ĝian mortkonvulsion. En efektiveco ĝi kontestas la fundamenton de la negra-afrika kulturo, kiu estas unu el la ĉefaj subtenoj de la nacia movado, disvolviĝanta en Franca Afriko. — La ambaŭ teorioj rigardas nur al unu flanko de la kultura problemoj en Franca Afriko, sen vidi ilian dialektikan rilaton, ĉar ili forŝiras la demandon de la kulturo for de aliaj demandoj. La neceso kontinui la afrikajn kulturajn tradiciojn aŭ la »afrika renaskiĝo« kaj la neceso konsciiĝi pri profundaj ŝanĝoj, kiujn la evoluo donis al la afrika socio, estas du ideoj reciproke sin kompletigantaj. Estas necese konsciiĝi pri ili, sed nur samtempe kun la ĝenerala evoluo, por kiu la ĉefa faktoro estas la vojo de popoloj de ĉiuj nacioj en la tuta mondo al libero kaj progreso. Tio estas potenca efektivo, kiu same en Afriko kiel ĉie aliloke gravas pli ol ĉiuj problemoj. La ĉefa aĵo por nuntempa vivo de popolo en nia lando estas batalo por liberigo el sub la sistemo subpremanta kaj ekspluatanta. Kaj en tiu ĉi batalo la kulturo havas eminentan rolon.

La nacioj konsciiĝas, ke ilia kulturo ne povas prosperi sen forigi la sistemon de premado kaj ekspluatado. Tio estas grava faktoro por atingi politikan sendependecon kaj ekonomian bonstaton, kiuj senprokraste estas potenca stimulo por la kulturo.

Tiel la perspektivoj de la kultura disvolvigo en Franca Afriko malfermiĝas sen iu ajn dubo en rilato al la batalo por firmigo de la rajtoj de la afrika popolo, decidi pri si mem. Kontraŭ tio starigas sin la imperiista kaj koloniista reĝimo, kies forigo estas la unua premo de granda disvolvado de ĉiuj kulturaj eblecoj, kiujn havas la Afrikanoj.

Ĉio, kio servas al tiu ĉi batalo, servas samtempe al la afrika kulturo. Kaj ĝuste rilate al tiu ĉi batalo ni prijuĝas la valoron de la literatura kaj arta kreado en Franca Afriko. Ni ne volas la verkojn de la pasinteco eternigi en ilia antaŭa stato kaj ni ne klopodas turni ĉiun evoluon de la kulturo en Franca Afriko al formoj de pasinteco, sed ni strebas pri tio, malkovri en la kultura tradicio valorojn, kiuj plej bone servas al ilia nova disvolvigo. La tradicio nome ne baziĝas sur tio denove fari la samon, kion grandan la aliaj estas kreintaj en malnova tempo, sed en tio, trovi la genion, kiu ebligis kreadon de tiuj ĉi grandaj verkoj kaj kiu en alia tempo gvidos al kreado de tute aliaj verkoj.

La ĉefa kontraŭdiro, kiun oni prezentadas al ni, estas, ke la aŭtoroj de nia nova literaturo uzas plejparte la francan lingvon, kio laŭ opinio de iuj senigas iliajn verkojn de ĉiu originaleco de la afrika literaturo. Dum longa tempo estis tiu ĉi kontraŭdiro konsiderata kiel decida, kaj por ke estu eble forigi ĝin, oni dediĉis multe cetere tre interesa klopodo al tio, ke estu trovita komuna afrika lingvo, kiu, kiel oni pensis, estas sole kapabla esprimi laŭvere la afrika genion. — Sed same kiel la lingvo mem ne sufiĉas por krei la kulturon, la uzado de fremda lingvo ne estas nevenkebla malhelpo por la originala esprimo de tiu ĉi kulturo. Sed estas versimile, ke la franca lingvo ne estos unusola esprimrimedo de la afrika kulturo. En Franca Afriko ekzistas efektiva lingvoj, kiuj

povas esprimi ĉiujn artajn valorojn. Laŭ cirkonstancoj ili povas esti disponigataj por disvastiĝi kiel veraj lingvoj naciaj, sed ilia sorto same kiel ĝenerale la sorto de la kulturo estas kunligita kun sorto de la liberiga movado en Franca Afriko.

Estas sendube, ke en estonteco estos necese dediĉi ĉiam pli grandan atenton al la afrikaj lingvoj, el kiuj multaj, kiel ekzemple peulh, bambara, mossi, haussa kaj aliaj apartenas al tre signifaj homaj aglomeraĵoj kaj sekve de disvolvo de merkato ili disvastigis la teritorion de siĝ atingo.

Sed mi supozas, ke ne estas eble trovi ĝustan solvon por la problemo de la afrika kulturo, ĝis kiam ni solvos la fundamentan demandon, la demandon pri loko de la afrika popolo en la mondo kaj pri ĝia tasko en la epoko de imperiismo. La evoluo de la kulturo same kiel la evoluo de la demokratio dependas de rezulto de la liberiga batalo, kiun luktas la popoloj de koloniaj nacioj de la tuta mondo.

En verkoj de niaj junaj artistoj flagras potenca flamo, kiu instigas la popolon de Afriko ĉe ĝia partopreno en la batalo de demokratiaj kaj pacaj fortoj por efektiviĝi la homan revon malnovan kiel la mondo mem, t. e. atingi liberan kaj feliĉan vivon.

El Lidové noviny 20. VIII. 1950 tradukis Adolf Staňura.

*

MAJA LULKANTO

Ni ludu fabelon, tiun el revo —
okulojn fermu jam, nokto nun venas,
en la fenestron falis jam stel',
printempa sono de l'tero en krevo
sur mola muskejo svenas,
en nigra konto eĥas ĉiel'.

Ni ludu fabelon pri homa feliĉ',
rakontas nokto, aŭdas la lun' —
sur via buŝo mortas ridet',
ŝtono kaj suno, lando de l'riĉ' — — —
mi kredas sorĉon, mi sentas ĝin nun ...
ĉu vi jam dormas, dolĉa inet'?

Ni ludu fabelon, tiun el neĝ',
neĝblanka neĝo de l'arbo en flor'l
Manon mi levas al senvorta Dio,
panon alian petas en preĝ'.
Ni ludu fabelon, helas jam hor',
nokto perdiĝas en birda krio,

ni ludu fabelon, venas maten',
orfa infano el blanka imag',
sorĉo forbrulos en kanto de l'sun';
ĝis nun ni ludis nur, ide, sen pen' —
nokto jam pasis, venas la tag':
fabelon vivi devas ni nun.

Eva Suchardová

*

Amsezonoj

Printempa amo — flirta sent', Malfrua amo de aŭtun' —
kaprica kiel maja vent', post nuboj palas laca sun';
lepora salt' en malkviet', la tulpoj sinke klinas sin,
burĝona kant' de la poet'. vualas koron svenpatin'.

Pasiaj amoj de l'somer' — La vintra am' — velkinta flor'
ĉieltoastoj kun infer', jam senkolora, sen odor',
sangruĝaj rozoj en buked', ĝin kovras ŝirme neĝa fel',
ŝiritaj sur edena bed', tapiŝo blanka al ĉiel'.

Eli Urbanová.

KRONIKO ENLANDA

Aleo de D-ro Zamenhof en Bohumín estis inaŭgurita la 20-an de majo 1951. Ĝi estas ĉefa aleo kondukanta al centro de la urba parko, kie staras Esperanto-monumento. La soleno okazis je la 10-a horo dum ĉeesto de multaj samideanoj el la regiono kaj aro de ne-esperantista publiko. Lokan Nacian Komitaton reprezentis s-ro instruisto Huser. Krom esperantistoj el la regiono ĉeestis: Jan Raszka el Pollando, vicprezidanto de la Centra Komitato Rud. Hromada el Praha, redaktanto de »Esperantisto Slovake« MUDr. Lud. Izák kaj lia edzino el Turĉ. Sv. Martin, s-o Tichý por E-junularo el Bratislava, s-o Chladný el Vrútky, s-ino Kaplerová el Brno-Zidenice, s-o Svačina el Lanžhot. La ceremonion malfermis s-o R. Kaminský emfazante preĝipe la ideon de batalado por paco, en kiu partoprenas ĉiuj esperantistoj, ĉar ĝi estas esenca ero de ilia klopodado. Post li ekparolis reprezentanto de la Loka Nacio Komitato, dum kies diskurso falis vualo de sur la ŝildo kun nova nomo de la aleo. Poste mallonge parolis reg. per. s-o Vl. Slaný, Hromada, Dr. Izák, Raszka, Tichý, kaj Janouš. Finis la solenon s-o Kaminský per konstato, ke la hodiaŭa soleno, kiu signifas agnoskon de nia celado fare de Loka Nacio Komitato, estas grava impulso por plua esperantista laborado.

Posttagmeze je la 14,30 horo okazis en stacidoma restoracio regiona konferenco. Malfermis ĝin prezidanto de la Fervoja Esperantista Rondeto R. Kaminský kaj gvidis ĝin re-pe Vl. Slaný. Rud. Hromada raportis pri aktualaj problemoj de la movado. Kiam la Kilian-lernolibro ne estos plu disponebla, estas bezone klopodi por eldonigo de lernolibro respondanta al nuna politika kaj kultura situacio. La Centra Komitato turnis sin al s-oj Kilian kaj Lukáš kun peto verki kune modernan lernolibron, kiun eble povus eldoni Orbis. Provizore ni povas proponi sole ciklostilitajn tekstojn instruajn. Mankon de Esperanta-ĉeĥa vortaro ni forigas per enmeto de vortaro de radikoj en Esperantistan. Tia vortaro sufiĉos por multaj celoj. — La gazeto »El Popola Ĉinio« estas nun abonebla ĉe la Asocio librovendejo. — Prezidanto de Junularo en Ostrava parolis pri Kursaro en Rožnov invitante al grandnombra vizito. Pluraj kluboj decidis sendi du-tri el siaj membroj al Rožnov. Klubo en Třinec, ricevinta subvencion de 20 000 Kčs, sendos tri, tiu en Olomouc unu, pluraj aliaj lokaj grupoj pripensas similan decidon.

En la fino prelegis Dr. Pawlik pri fakaj terminoj por maŝinfako kaj elektrotekniko. Li kompilis vortareton de 226 terminoj tiuspecaj. Ĝi aperis ciklostilite kaj estas ricevebla po 2 Kčs. Dr. Pawlik klarigis signifon de multaj tiaj terminoj, ofte kun bildoj. Ĝi estis prelego tre instrua.

Demokratia Respubliko Viet-Nam konfirmis al ni ricevon de nia materialo pri pacobatalado sendita al Vietnamo Esperanto-Asocio pere de Vietnamo reprezentanto en Thailando. La letero estas el Bangkok, la 3-an de majo 1951, siano PV/1497/NG.

La ĉeĥan afiŝon »Ek al batalo por paco« (Do boje za mír) kun bildo de la laborista pacobatalanto reoresis japana sindikata gazeto »Rodosya«. La sama ĵurnalo, kiu nuntempe anstataŭas la malpermesitan organon de Komunista Partio de Japanujo, represis japanlingvan tradukon de la letero sendita de Ŝkoda fabrika konsilantaro al japana metal-laborista sindikato (vidu paĝon 52!). La korespondado inter ĉeĥaj kaj japanaj laboristoj estas verkata ĉeĥe kaj japane helpe de esperantlingva tradukado. En Plzeň peras ĝin Rud. Burda.

Ekzamena Komisiono kunsidis la 24-an de majo 1951. La ekzamena senato konsistis el Dr. Stan. Kamarýt, prez., Dr. Tomáš Pumar, Dolfá Bartošik, Ota Ginz. Estis ekzamena s-ino Eliška Urbanová, kiu ellaboris hejman taskon »Kiel aŭskulti muzikon«. Ŝi estis klasifikita kiel eminente kapabla instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj.

»**Interesa naturscienca kolekto en Plzeň**« estas titolo de artikolo aperinta 20. IV. en Lidová demokracie, Plzeň. La artikolo diras, ke la kolekton, nun ekspoziciitan en pavilono apud rivero Radbuza, alportis el diversaj landoj kelkaj entuziasmuloj, kiuj per Esperanto akiris amikojn en eksterlando kaj bicikle ilin vizitis. (O. G.)

La letero de la japanaj sindikatanaj metallaboristoj aperis japanlingve kaj en ĉeĥa traduko en la ĵurnalo Práce en Praha la 12. V. 1951.

Donackesistoj por japanaj pacbatalantoj. Resuman raporton sendis Keitaro Ota (Yukava 9 to-shi, Shiguoka - prefekturo), kiu estis je la 4. II.—7. IV. arestita pro publikigo de paco-rezolucio, poste partoprenis kampanjon de regionaj balotoj kiel kandidato kaj preparadis la unuamajan manifestacion, kaj la 3-an de majo sendis la leteron, el kiu ni sciiĝas, ke la Centra komitato de Rono Kyuen Lai (»Ruĝa helpo«) kolektis ĉiujn kestetojn el Tokia regiono, nutraĵojn transdoneblajn en la arestejojn sendis al la malliberigitaj pacobatalantoj, la ceterajn objektojn (cigaredojn, pupojn k.-s.) ekspoziciis en Tokio, poste vendis ilin kaj ricevitajn monon uzis por helpi al familianoj Macukaŭ-aj. La samon konfirmas letero de Tatsuji Fuse el 17-a de majo el Tokio.

Fr. Pytloun sesdekjara. La vicon de jubileantaj sesdekjaruloj ĉi-monate eniras unu el la plej fervoraj esperantistaj propagandistoj kaj verdstelanoj, samideano František Pytloun, asocia regiona peranto en Hradec Králové.

Li naskiĝis la 30-an de junio 1891 en Váprno apud Český Dub. Li elektis por si vere feliĉan okupon ĉe ŝtataj fervojoj - feliĉan pro tio, ĉar li ŝatas vojaĝi, sed ĉefe pro tio, ke li povu bone uzi tiun avantaĝon por la efika propagando de nia lingvo kaj movado. Li fariĝis esperantisto en la jaro 1923 kaj oni povas tute prave diri, ke jam de tiu jaro li restis fidela al nia movado ĝis hodiaŭ. En Bakov n. J. li komencis instrui Esperanton jam en 1925, fondis tie klubon, kiu apartenis al la plej viglaj en nia lando. Transloĝinte al Hradec Králové, li ankaŭ tie plenumas honorajn devojn por Esperanto unue inter fervojistoj kaj oficistoj de la fervojdirekcio. Post la okupacio li suprenlevis esp. flagon en Hradec Králové, ekvivigis tie la movadon, fariĝis kluba prezidanto. Li gvidis multajn kursojn en tuta orienta Bohemio kaj fariĝis konata pro siaj skribaj kursoj de Esperanto.

La estraro de nia Asocio bone rimarkis la aktivecon de lia sukcesplena laboro kaj nomis lin regiona peranto por la regiono Hradec Králové. De tiu tempo ne ekzistas preskaŭ iu pli grava entrepreno esp-ista, al kiu nia fervora jubileanto ne almetus helpon ĉu per sia konsilo, ĉu per efektiva laboro aŭ minimume ne apogus la aferon per sia ĉeesto. Bonajn servojn li faras al niaj samideanoj prizorgante al ili necesajn esperantaĵojn, propagandilojn ktp. Bone konata li estas ankaŭ kiel helpsekretario kaj instruisto de la somera kolegio en Doksy kaj Svít. Kun samideano Kořínek el Brno li zorgas pri gazetara servo. En la jaro 1934 submetis sin al la ekzameno pri instruktableco en Silkeborg (Danujo) kaj de tiu tempo li instruas Esperanton laŭ la Ĉe-metodo en multaj lokoj de nia lando. Estas lia merito, ke estis fonditaj memstaraj kluboj kaj rondetoj en Mnichovo Hradiště, Turnov, Mladá Boleslav, Česká Skalice kaj fine en Rychnov n. Kn. Li fariĝis komitatano ne nur de la enlanda tutŝtata organizaĵo esperantista, sed ankaŭ de la internacia.

En malmultaj linioj neeldirebla estas granda laboro, kion nia samideano Pytloun tiel sukcese entreprenas por bono de nia movado. Sed du gravajn punktojn estas tamen necese ankoraŭ mencii: 1. ke li loĝas en la strato nomita Zamenhofstrato (kio estas ankaŭ ĉefe lia merito) kaj due, ke ambaŭ liaj filoj estas bonaj esperantistoj (Slávek efike laboras por Esperanto en Liberec kaj Jiří, opera kantisto, nun soldato, gvidas esp. rondeton inter siaj kamaradoj — soldatoj).

Ni sincere gratulas al nia bona batalanto ĉefe pro tio,



Frant. Pytloun sesdekjara.

ke li atingis sian sesdekon en plena vivforto kaj sano kaj rigardante lian ĉiam ridetantan vizaĝon ni forte esperas, ke li certe ankoraŭ plurajn jardekojn dediĉos al tio — kion li amas plej multe — al Esperanto. — (Dolanský.)

Membro de nia grupo en Lanškroun s-o Josef Cink, studanto de III-a klaso de gimnazio, ricevis en literatura konkurso inter junularo en Regiono Pardubice la unuan premion pro rakonto, kies temo estis Esperanto. Ni presas pli ol duonon de la rakonto en la ĉeĥa originalo. Titolo de la rakonto estas »Kontribuo al paco«.

*

Příspěvek míru

Karel jde dnes domů nějak zamyšleně. Nevšimá si okolí. Nezajímá ho ani tabule s pestrými směsími plakátů, na které si vždy našel některý, nad nímž se zastavil a pečlivě přečetl. Nevšimá ani novou výlohu hodinářského obchodu ani nový typ radia značky »Tesla«. V mozku mu uvízla dnešní hodina občanské nauky. Mrzí ho Novákův výrok, že on musí být stále v opozici.

»Já mu ukáži, že dovedu pro mír taky něco udělat. A přece mohu projevit svůj názor, ne?«

A přemítá dál. »Mýlil jsem se, to je pravda. Přece když si politikové vymyslí válku, sami bojovat nepřijdou. A lidé nechtějí válku. Žádný z nás nechce válku.

V naší zemi znají příčiny válek, a proto vědí, jak proti ní bojovat. Ale v zemi, kde vládnu ti moji politikové, jsou lidé ohlupování jejich rozhlasem a tiskem. Většina z nich neví, kde je jejich nepřítel. Takové lidi je nutno uvědomovat. Ale jak? Pokrokově smýšlející lidé tam jsou pronásledováni. A přece i tam pokračují mírové snahy, ale velmi těžko. A tam je třeba nejvíce pracovat pro mír. Jenže takto pracovat pro mír já nemohu. Musím se zas jen učit a učit.«

Takové a podobné myšlenky mu víří hlavou. Nenachází

východisko. Chce ukázat, že lze i jinak než učením, přispívat k obraně míru. Neví však jak, neví čím.

